

Kvara Eŭrop-Unia 2000 Esperanto Kongreso


La Memorejo 'Princo Karlo'



Atlantikwall



RAVERSIIJDE



Kunlaboris al la traduko: Walter Poppeck, Roland Rotsaert, Patrick Van den Berghe, Lode Van de Veldē.

La numeroj de la paragrafoj referencas al indikiloj en la muzeo.

La Memorejo 'Princo Karlo'



Bonvenon en la Memorejo 'Princo Karlo'. Ni invitas vin viziti ekspozicion dediĉitan al Princo Karlo, Regento de la Reĝlando Belgio de 1944 ĝis 1950. Bonvenigas vin lia busto, farita de Eugène de Bremaecker, montranta la Princon kiel juna subleŭtenanto de la Regimento de Skoltoj.

Vi estas en la Flandra Salono. La nomo memorigas salonon en la brusela Reĝa Palaco, dum la Regenteco aranĝita de la Princo en flandra stilo.

La salono estas konstruita de la germana okupanto en 1941 kiel manĝejo por la soldatoj de la baterio Saltzwedel neu, nun parto de la Subĉiela Muzeo Atlantikwall (Atlantika Muro – tiu oficiala nomo estas iom-stranga kombino de germana kaj angla vortoj). Post la milito la konstruaĵo estis draste transformita laŭ instrukcioj de Princo Karlo. Ĝi ricevis grandan dudeklivan tegmenton kaj pezan lignan plafonon. En ĝi la Princo konservis parton de siaj kolektoj. Li instalis etan muzeon kie estis montritaj memorigaĵoj al la familio. Kelkaj eroj estas de antaŭ Leopold I.

Ekde 1988 la ŝtata Regio de Konstruaĵoj tute renovigis la domon. Ĝi metis novan tegmenton kaj novajn lignajn trabojn.



La ekspozicio kronologie montras tri grandajn periodojn el la vivo de la princo. La unua sekcio temas pri la periodo 1903-1940. Enkonduke, simpligita genealogia tabelo situas Princon Karlo en la Dinastio. Centre estas liaj gepatroj, Reĝo Albert kaj Reĝino Elisabeth. Albert estis la filo de Filipo, Grafo de Flandrio, kaj de Maria von Hohenzollern-Sigmaringen, kaj iĝis reĝo de la belgoj en 1909 post la morto de sia onklo, Leopold II. Elisabeth estis la filino de Karl-Theodor, Duko de Bavario, kaj de Maria-Jozefa de Braganza, membro de la portugala reĝa familio. Dekstre estas la tri gefiloj: Leopold, Karlo kaj Marie-José.



Princo Karlo naskiĝis en Brussel je la 10a de oktobro 1903 kiel Charles-Théodore-Henri-Antoine-Meinrad. Ankaŭ lia pli aĝa frato Leopold naskiĝis en Brussel en 1901; la pli juna fratino Marie-José naskiĝis en Oostende en 1906. Kelkaj rimarkindaj fotoj el la personaj albumoj de Reĝino Elisabeth ilustras la junaĝon de la Princo. La Reĝino volonte kaj lerte fotis. La fotoj estas zorge ordigitaj en albumoj, konservataj en la arĥivo de la Reĝa Palaco. Plejparto de la fotoj videblaj en la Memorejo devenas de tiu arĥivo.



Ekde la surtroniĝo de Reĝo Albert en 1909 la familio plejofte loĝas en la kastelo de Laken (apud Brusel). La palaco (en la centro de Brusel) kutime estas la reĝa laborejo. La Princoj Leopold kaj Karlo estas edukitaj de gubernistinoj. Ili ne vizitas lernejon, sed ricevas hejman instruadon de kelkaj instruistoj. La Reĝa Ĉaledo en Oostende kaj la kastelo de Ciergnon estas ŝatataj loĝejoj de la familio. Albert kaj Elisabeth havas vilaon en De Panne. Ili ankaŭ ofte restadas en la Osterrieth-domo en Mariakerke, apud Oostende, kie naskiĝis Princino Marie-José. Ĉiŝomere la familio faras kelkajn ekskursojn al la Bieno de Raversijde.



Tiu bieno estas konstruita ekde 1903 laŭ deziro de Reĝo Leopold II. En la bieno estas dunoj, kie oni konstruas elegantan ĉaledon en norvega stilo kaj parkon kun lagetoj. En 1913 Reĝino Elisabeth registras la lastajn senzorgajn tagojn en bela foto-serio. Unu el la gastoj estas Arkiduko Franz-Ferdinand, tronheredanto de Aŭstrio-Hungario, murdota unu jaron poste kun la edzino en Sarajevo. Pro tiu murdo eksplodis la Unua Mondmilito.



Princino Marie-José ne rapide forgesos sian okjariĝon je la 4a de aŭgusto 1914! Je tiu tago eksplodas la Unua Mondmilito: grava rompo en la familia vivo. Je la 31a de aŭgusto la geprincoj estas transportitaj de Antwerpen al Britio, kie ili restadas ĉe Lordo Burzon ĝis februaro 1915. Tiam la gepatroj elektas lernejojn: Leopold iras al Eton College, Karlo al Public School de Wixenford kaj Marie-José al Ursulinoj en Brentwood. Nur dum la lernejoj ferioj la infanoj restadas en De Panne. La princoj ankaŭ ricevas militan trejnadon. Je la 5a de aprilo 1915 la 14jara Princo Leopold enregimentigis en 12a Infanteria Regimento. En februaro 1917 Princo Karlo komencas la studojn en la Royal Naval College en Osborne (insulo Wight, je suda brita marbordo).



Ĉi tiu monstrejo enhavas memoraĵojn al la junaĝo kaj lerneja periodo de Karlo: libroj kun rimarkindaj bindaĵoj kaj kron-monogramo, sed ankaŭ simplaj lernejoj verketoj. Interesaj estas la medalionoj de liaj avoj: pentrita miniaturo de Filipo, Grafo de Flandrio, kaj foto de Karl-Theodor, farita de la konata foto-studio Elvira en München. Sur la malantaŭa muro estas bela 19jarcenta litografio montranta la reĝan loĝejon en Ciergnon. Ankaŭ estas memoraĵoj de Wixenford College. Centre estas granda portreto de la Princo dekjara, pentrita de Alfred Bastien laŭ pli frua verko de la brusela artisto Albert Pinot.



En 1917 la 14jara Princo Karlo forlasas Wixenford kaj enskribiĝas je Naval College Osborne. Dum 9 jaroj li spertos la severan trejnadon de la Brita Mararmeo, ĝis li akiras la rangon de subleŭtenanto en 1926. Kiel siaj samklasanoj, li tie ricevos pezan edukadon, sen iu prioritata traktado. Tio grave influos lian postan vivon. En la vitroŝranko estas la aŭtentika brita mararmea uniformo kaj la akompana kepo de la Princo. Dum sia trejnado la Princo veturas per diversaj ŝipoj. Li ankaŭ partoprenas forajn marvojaĝojn. Kiam la Princo de Kimrujo en 1921 per la krosŝipo HMS Renown vizitas la Malproksiman Orienton, Karlo ĉeestas kiel kadeto. Kiel 18jarulo li veturas tra la Suez-kanalo kaj i.a. vizitas Bombay kaj Tokio. Alborde li ricevas la normalan traktadon, sed surtere li reakiras sian princan statuson kaj estas akceptata en la lokaj belgaj ambasadejoj. Dum sia libera tempo li ilustras sian taglibron per akvareloj, faritaj laŭ tradicia angla stilo, sed jam montrantaj la grandan talenton. Tiujn verketojn li signas per monogramo kun la literoj C kaj T (Charles-Théodore).



Reveninte el la Brita Mararmeo, ekde 1926 Princo Karlo plenumas sian reprezentan taskon kiel membro de la Belga Dinastio. Li enskribiĝas en la Militlernejo kaj partoprenas en la publika vivo de la Reĝa Familio. Ofte akompanas lin Barono Robert Goffinet, konsiderata kiel konsilanto de la Princo. Verkisto Karel Jonckheere skribis pri tio: 'En mia memoro la aperon de Princo Karlo akompanas la aŭtuna vetero, inter la Reĝaj Galerioj kaj Palace Hotel. Li estis ĉiam akompanata de lia adjutanto kun peceto da ŝtofo sur unu okulo, kiel Mosje Dajan. La gravuloj ne multon diris; ili kutime rigardis la grizecon de la maro. Tio akordis kun la legendo ĉirkaŭ la Princo: li ofte ludis orgenon, eĉ legis poezion kaj estis inĝenia mekanikisto de trajnetoj. En la monstrejo estas personaj vestaĵoj kaj objektoj el tiu periodo. La montrata ministra kasko referencas al vizito al la karbominejo de Manage en 1927.



La monstrejo ilustras la militistan karieron de la Princo ĉe la Regimento de Skoltoj. Ekde sia ĵurado kiel subleŭtenanto li trapasas ĉiujn rangojn ĝis kiam li atingas la rangon de kolonelo en 1939. Enestas la diplomo de majoro, la mantelo kaj la kasko. Li ankaŭ estis majoro de la aerarmeo.



Robert Goffinet naskiĝis en 1886 kaj apartenis al familio kiu estis intime ligita al la Dinastio. Adrien Goffinet (1812-1886) estis adjutanto de Leopold I kaj administris la buĝeton de la juna Leopold II. Liaj filoj, la ĝemeloj Auguste kaj Con-

stant, sekvis la patron kaj iĝis la ĉefaj konfidenculoj de Leopold II. Robert Goffinet estis ilia kuzo. Dum la Unua Mondmilito li volontulis apud la fronto kie li en 1917 perdis unu okulon.. En 1918 li estis adjutanto de Reĝo Albert kaj de 1929 ĝis 1931 li funkciis kiel intendanto de la Civila Listo (la administracio kiu mastrumas la reĝajn bienojn). En 1932 li estis dungita de Princo Karlo kaj rapide iĝis ties konfidenculo. Lia subita morto en 1945 grave emociis Princon Karlo. Li respektoplene konservis la portreton de Goffinet, pentritan de Reĝino Elisabeth kaj la okulan ŝtofpecon.



Jen rekonstruo de la skribtablo de Princo Karlo. Sur ĉiuj objektoj estas lia monogramo, kiu konsistas el du kronumitaj, interplektitaj C-oj, kiuj referencas al la nomo Charles. Evidentas la princa prefero por la koloro ruĝo, ofta ankaŭ en lia loĝejo, vizitebla poste. La bronza medaliono estas verko de la genta skulptisto Geo Verbanck. La kompleto de kupraj matricoj estis uzata por ornamo librobindaĵojn. Por plejparto de la libroj el la princa biblioteko belgaj bindistoj faris bindaĵon kun ruĝa aŭ plurkolora ledo.



La Reĝa Familio havas artan tradicion. Princo Karlo jam ekde sia junaĝo montris nekontesteblan talenton por desegno. Tiun talenton li sendube heredis de sia patrino, Reĝino Elisabeth, kaj de sia avino, Grafino de Flandrio. La artan tradicion ilustras reproduktaĵoj laŭ akvareloj de Louise-Marie, unua Reĝino de Belgio. Ankaŭ videblas originala akvarelo de Princino Clémentine, filino de Leopold II. Maria, Grafino de Flandrio kaj avino de Princo Karlo estas reprezentata per unu el siaj gravuraĵoj kaj ankaŭ troviĝas ĉi tie muldaĵo laŭ skulptaĵo de Reĝino Elisabeth montranta sian nepon Albert, kvarjaran.



Maria von Hohenzollern-Siegmaringen, naskita en 1845, estis la edzino de Filipo, frato de Reĝo Leopold II, do patrino de Albert I. Ŝi havis grandan amon al gravurado kaj postlasis grandan verkaron. Plejparto de la gravuraĵoj montras pejzaĝojn kaj pitoreskajn lokojn. Ŝi multe laboris en la Ardenoj, sed ankaŭ en Germanio, Svislando kaj Italio. Plej konata estas aro da gravuraĵoj kun pejzaĝoj de la valo de la rivero Semois, publikigita en 1910, kies profito estis destinita al societo por malmultekostaj laboristaj loĝejoj. Ŝi ankaŭ patronis societojn kiuj stimulis gravur-arton. Ŝi multe ŝatis sian nepon Karlo, kies artan talenton ŝi antaŭvidis. Post ŝia morto li ricevis grandan parton de ŝia heredaĵo.



Portreto de la kvarjara Princo Albert, farita je Kristnasko 1938, sendube estas la plej konata skulptaĵo de Reĝino Elisabeth. Bone konataj estas ŝia muzika talento kaj ŝia granda interesiĝo por la arto, sed malpli konata estas ŝia skulptado. Tra la violonĉelisto Alexandre Barjansky, kun kiu ŝi regule muzikis, ŝi ekkonis ties edzinon, la skulptistinon Cathérine Barjansky, de kiu ŝi ricevis siajn unuajn lecionojn. Siajn temojn ŝi ĉiam trovis tuj apude: familio, korteganinoj, amikoj. Komence ŝia tekniko havis klarajn Art Déco-ecojn, sed ŝi rapide evoluis al klasikaj formoj. La verkaro ĉiam restis figura, kun emfazo al la psikologio de la modelo. Ŝi modlis per argilo kaj vakso. Ĉiuj verkoj poste estis mulditaj en gipso. De plejparto ekzistas versio en bronzo. La skulptisto Courtens skulptis kelkajn el marmoro. Ĉiuj havas la monogramon 'E' kaj la daton. En la loĝejo de la Princo videblas pliaj verkoj ŝiaj.

En 1997 la kompleta verkaro estis ekspoziciita en la Memorejo. La katalogo de la ekspozicio ankoraŭ estas havebla.



Je la 10a de majo 1940 ankaŭ por Belgio komenciĝas la Dua Mondmilito. Princo Karlo partoprenas la 18tagan militiron kiel kolonelo ĉe la stabo de la Kavaleria Divizio. Li vizitas la unuojn kaj regule estas proksime al la Reĝo. Li estas en la kastelo de Wijnendale, kiam okazas la rompo inter Leopold III kaj liaj ministroj. Post la kapitulacio, la Princo kun Reĝino Elisabeth sub germana eskorto estas transportita al Germanio. Dum la milito li ĝuas relativan liberecon kaj sin dediĉas al la militkaptitaj oficiroj kaj soldatoj. Per personaj intervenoj li ankaŭ klopodas plibonigi la sorton de politikaj kaptitoj.

Je la 7a de junio 1944, unu tagon post la alianca alteriĝo en Normandio, Reĝo Leopold III estas transportita al Germanio. Princo Karlo ne volas subiri la saman sorton kaj kaŝas sin. Post mallonga restado en brusela kliniko li biciklas al la Ardenoj. Dum kelkaj monatoj li restas en Sart, apud Spa, sub diversaj kaŝnomoj kaj kun falsaj identecpapiroj. La lokuloj alparolas lin kiel 'Monsieur Richard'.

Dum tiuj monatoj li havas intensajn rilatojn kun rezistadaj grupoj el la ĉirkaŭaĵo. En iu momento estas plano por aviadile porti lin al Britio, sed la plano ne realiĝas. Iom antaŭ la liberiĝo li malaperas el Sart. Poste la enloĝantoj rekonos lin kiel nova Regento de la lando.

Videblas la originala biciklo per kiu la Princo veturis en la Ardenoj. Granda foto montras la nunan aspekton de la domo en Sart kie li restadis. Nun ĝi nomiĝas 'Maison du Maquis'. La franca vorto 'maquis' signifas ne nur montaran vegetaĵon, sed ekde la Dua Mondmilito estas ĝenerale uzata por la rezistado, kiu serĉas kaŝejojn en la montaro.



En la ekspozicio estas enscenigo de Princo Karlo ĉe la Unua Regimento de Skoltoj, la regimento al kiu li apartenis dum sia militkariero. La Princo estas maldekstre, vestita per uniformo de kavaleria kolonelo. Apude estas soldato de la Regimento. En 1940 tio estis motorizita unuo: konstateblas per la motorcikla kasko kiun la soldato tenas en la mano. Fone estas ĉevalo kun rajdanto de la sama unuo. La rajdanto referencas al la tradicioj de la Regimento Skoltoj, konsiderata kiel elito de la belga armeo.



La dua parto estas komplete dediĉita al la periodo de la Regenteco kiu sekvis al la Dua Mondmilito. Pro malĉeesto de Reĝo Leopold III, kaptita en Germanio, Princo Karlo je la 20a de septembro 1944 estas elektita Regento de Belgio. Kiel membro de la Dinastio li garantias la daŭrigon de la monarkio. Li aperas en uniformo de kolonelo, rangon kiun li efektive havis en 1940. Li vizitas la Brigadon 'Piron' kaj renkontas la Reĝon Georges VI. Li akceptas generalon Eisenhower en la Flandra Salono de la palaco kaj ankaŭ povas bonvenigi generalon De Gaulle kaj Winston Churchill.

Li ricevas la plej altan usonan dekoracion 'Chief Commander Legion of Merit'.



Centre en la sekcio estas rajdanto-portreto de la Princo, pentrita de José Storie el Brugge (1899-1961). Li famiĝis precipe kiel portretisto. En facila stilo li eternigis multajn guberniestrojn, urbestrojn kaj altrangulojn. Storie estas konsiderata kiel unu el la instruantoj de la Princo.



Dum la Regenteco estas faritaj poŝtmarkoj kun la bildo de Princo Karlo. La markoj estas presitaj en multaj koloroj. Ekzistas provoj de plenaj folioj de 50 markoj, sed ankaŭ folietoj kun nur unu marko. Ekzistas versioj dentitaj kaj

nedentitaj, kun kaj sen valor-indiko. La poŝtmarkoj estis presitaj en Londono sed neniam cirkuladis. Nun ili estas filateliaz rarajoj.



De la 28a de junio ĝis la 12a de aŭgusto 1947 la Princo-Regento oficiale vizitas Belgan Kongon. Tie li estas entuziasme bonvenigita. En la ŝranko kelkaj objektoj rememorigas tiun vojaĝon: kolonia uniformo, diversaj tropikaj kaskoj, epoletaj ŝnuroj de la adjutanto kaj sekureca kasko donacita al Karlo okaze de vizito al la kuprominejo de Katango. La tuton kompletigas malgranda portreto de la Princo en generala uniformo, pentrita de José Storie. Efektive, je tiu okazo li unuafoje, laŭ konsilo de la Ministro de Defendo, portis uniformon de leŭtenanto-generalo.



De la 3a ĝis la 14a de aprilo 1948 la Princo-Regento oficiale vizitas Usonon. Li transdonas al Prezidento Truman la belgan meritkrucon, destinitan al usona nekonata soldato. Krome li renkontas generalon Maxwell Taylor, estron de la Militakademio West Point. Poste, de la 15a ĝis la 18a de aprilo 1948, li vizitas Kanadon. En 1949 la Princo vizitas Italion, kie li estas akceptita de la Papo. Revojaĝante tra Svislando, li havas interparolon kun lia frato Leopold en la belga ambasadejo de Bern.



Centre estas la parada uniformo de la Princo-Regento. Tiu uniformo havas la kolorojn de la Regimento de Skoltoj. La mallonga blanka jakto, foje nomita 'spencer' (ankaŭ ekzistas nigra versio) havas ŝultraĵojn kun tri generalaj steloj. La insigno sur la kaskedo pravas ke Princo Karlo dum la Regenteco daŭre portis la monogramon de Reĝo Albert. La manumbutonoj havas la personan monogramon de la princo.



En la centra montrejo estas kelkaj provstamprovoj de moneroj kun bildo de Princo Karlo. Ili estis kreitaj en 1948 per dekreto de la Regento kaj desegnitaj en 1949 de la skulptisto Arthur Dupagne. Ili havas la latinan tekston 'Carolus Princeps Regens Belgicae'. Estas provoj de 1000, 100, 50, 20 kaj 5 frankoj. Krome estas provstamprovoj de 20 kaj 10 centimoj. Ĉiuj havas la mencion 'essai' (provo). La provoj estas stampitaj en plurajn metalojn. De la monero de 1000 frankoj ekzistas kelkaj oraj ekzempleroj. Tiuj moneroj neniam cirkulis.

En la sama ŝranko ankaŭ estas kelkaj libroj el la biblioteko de la Princo-Regento kun dediĉoj de la kantisto Maurice Chevalier kaj de Winston Churchill. Unika estas la tute malregula generala ĉapo kun insignoj de la Regimento de Skoltoj.



En referendumo de la 12a de marto 1950 plimulto favoras la revenon de Reĝo Leopold III. Je la 20a de julio 1950 la Regenteco de Princo Karlo finiĝas.

Li ekloĝas en Raversijde, en bieno kiun li preferas ekde 1930 kaj kiun li sisteme pligrandigis. Jam dum la Regenteco la dum milita damaĝo de la konstruaĵoj estas riparita. Dum monatoj kamionoj transportas la multajn posedaĵojn de la Princo al Raversijde. Granda parto de la reĝa meblaro neniam trovas lokon en la malgranda loĝejo de la Princo kaj estos stokita en aliaj konstruaĵoj de la bieno. Pli da informoj pri la t.n. 'reĝa disputo' estas sub 75.



Je la liberiĝo en septembro 1944 Reĝo Leopold III ne estas en la lando. Kelkajn monatojn antaŭe li kun sia familio estis fortransportita de al Germanio. Dum lia foresto Princo Karlo kiel Regento transprenas la regadon de la lando. Kiam je la 8a de majo 1945 la milito finiĝas, la Reĝo principe povas reveni al Belgio. Tuj Princo Karlo kun siaj ministroj veturas al Aŭstrio kie restadas la Reĝo. Leopold III deklaras al la ĉefministro Van Acker ke li pro malsano rezignas pri tuja reveno kaj petas sian fraton Karlo daŭrigi la Regentecon ĝis lia resaniĝo.

Dum la sekvaj monatoj kaj jaroj okazas politikaj turniroj, en kiuj multaj registaroj stumblas pro la demando ĉu la Reĝo jes aŭ ne rajtas repreni siajn funkciojn. La Regenteco daŭras multe pli longe ol oni iam povis antaŭvidi.

En la referendumo je la 12a de marto 1950 57,68 % de la loĝantaro estas por reveno de Leopold III. Tamen estas grandaj regionaj diferencoj: 72 % en Flandrio, 48 % en Brusel kaj 42 % en Valonio.

Je la 22a de julio 1950 la Reĝo revenas al Belgio. En mesaĝo al la prezidantoj de ambaŭ ĉambroj de la Parlamento, li deklaras: *Mi aliĝas al la omaĝoj al mia frato, la Princo-Regento, okaze de la finiĝo de lia tasko. Garantianta la kontinuecon de la Monarkio, li akiris meritojn de la Patrujo.*

Pro la streĉita situacio Leopold III je la 1a de aŭgusto provizore transdonas la povon al sia filo Baldueno. La definitiva abdiko sekvas je la 16a de julio 1951, kiam Princo Baldueno iĝas plenaĝa.



La lasta parto de la ekspozicio rilatas al la periodo 1950-1983 kaj koncentriĝas je la artista kariero de Princo Karlo.

Post la Regenteco li turnas sin al Alfred Bastien. Tiun artiston li ekkonis en la tridekaj jaroj tra barono Goffinet. En la laborejo de Bastien en Brusel la Princo denove dediĉas sin al la desegno-arto, kiun li ne plu praktikis depost sia restado en la brita mararmeo. Tial Bastien povas esti konsiderata kiel ĉefa instruanto de la Princo.

Pli da informoj pri Bastien estas sub 77.



Alfred Bastien naskiĝis en Elsene (Brusel) en 1873. Li gajnis la Godecharle-premion en 1897, kiu ebligis al li fari longajn vojaĝojn kaj registri impresojn en multkoloraj scenoj. En 1913 li finpretigis la panoramon de Kongo, ekspoziciitan en la sama jaro en la Monda Ekspozicio en Gent.

En 1914 li iĝis militvolontulo kaj je la rivero IJzer kolektis materialon por la 'Panoramo de IJzer', verŝajne lia plej konato verko. Tiu grandega tolaĵo inter la mondmilitoj estis ekspoziciita en Oostende. Kie nun estas la urbdomo, oni konstruis grandan rondan ejon por la Panoramo. En 1940 ĝi estis grave difektita. La pentraĵo daŭre ekzistas kaj estas konservata en la Armea Muzeo en Brusel, sed ĝi estas reriparebla.

En 1928 Bastien iĝis direktoro de la brusela Akademio de Belaj Artoj. Li pentris per gajega koloraro kaj restis fidela al la tradicia pentroarto de la iamaj grandaj majstroj. Li restis je granda distanco de la novaj evoluoj; tial li fariĝis solulo je la fino de sia kariero. Per facila, sed foje akra plumo li diskonigis sian opinion. En siaj memoraĵoj li tre trafe priskribis siajn renkontojn kun la Princo. Je la morto de Bastien en 1955, la rilato kun la Princo jam estis tute malvarmiĝinta.



La multaj memportretoj kiujn Princo Karlo faris post la Regenteco montras lian detalan observokapablon. Certe helpis la entuziasma gvidado de Alfred Bastien. La strikta regulo fari ĉiutage unu memportreton havas klaran rezulton. Post jaroj da malaktiveco la Princo baldaŭ denove atingas akcepteblan nivelon. En sia pejzaĝoj li limigas sin al iom rapidaj impresoj en kraĵono, kiujn li poste ellaboras per koloroj.



Princo Karlo ne estis profesia artisto: lia verkaro estas tro neregula kaj stile tro disa. Kiel ĉiu amatora pentristo li estas forte influata de la verkoj de aliaj artistoj. Vizito al ekspozicio aŭ renkontiĝo kun alia artisto povas komplete alidirektigi lin. Ekzemplo de tio estas abstrakta pentraĵo, montrita ĉi tie, aspektanta surprize freŝa. Pri ĝi la Princo diris: *La abstrakto venas al vi kiel kato, trudas sin. Kiam mi havas emon labori abstrakte, mi ne hezitas por esprimi kion mi sentas.*



Li ankaŭ iom ŝatas faŭvismon, tendenco kun origino en Francio, sed kun multaj sekvantoj en Brabantio. Trajto estas abunda uzado de koloroj. La centre pendita oleopentraĵo kun vido al arbaro bone ilustras la faŭvisman teknikon de la Princo.



Finfine la verkaro de la Grafo de Flandrio evoluas al tekniko en kiu la baza desegnado estas disigita en kelkajn kolorajn surfacojn. 'La insulo Wight' estas bela ekzemplo. Ne malofte la Princo reprenas malnovan desegnaĵon por adapti ĝin al sia aktuala stilo. Pro tio sur multaj verkoj estas markitaj du jaroj.



Tute en la stilo de la sepdekaj jaroj estas la ruĝvelura kostumo en kiu la Princo ofte aperis en privataj akceptoj. Kun ĝi li portas larĝan rimenon kun kupra plato, montranta sian konstelacion 'pesilo'. Dum siaj maloftaj publikaj aperoj li bezonas promenbastonon, kaj ofte li apogas sin sur la ŝultro de sia akompananto. Foje li partoprenas patriotismajn oficialaĵojn, sed multe pli ofte li videblas en artaj ekspozicioj aŭ okaze de vizitoj al artistaj laborejoj. Li amikiĝas al Paul Delvaux. Ankaŭ Labisse, George Grard, Leonor Fini kaj multaj aliaj estas amikoj liaj. De proksime li sekvas la laboron de bildstrio-desegnistoj Hergé kaj Edgar P. Jacobs.



Kiel 'Karlo de Flandrio' Princo Karlo unuafoje en 1973 ekspozicias siajn verkojn en la brusela galerio Racines. Poste la ekspozicioj rapide sin sekvas. Unu el la lastaj okazas en Londono en 1981. Tiam lia verkaro finiĝas. Ĝi enhavas proksimume 600 oleopentraĵojn, pli ol 800 'gouaches' kaj akvarelojn, kaj sennombrajn desegnaĵojn. En la montrejo estas multaj invitiloj kaj afiŝoj. Karlo de Flandrio kutime signas siajn verkojn per okangula monogramstampo. En la ŝranko ankaŭ estas la lastaj, ne finitaj memportretoj de la Princo. Tipe estas la flava bazo de la panelo, sur kiu estas metita akurata liniodesegnaĵo, poste kolorata.



Jen la lastaj fotoj kiuj ekzistas de la Princo. Li jam suferas pro la aĝo kaj havas sanproblemojn. Por protekti sian bienon kontraŭ spekulaciantoj, li vendas ĝin al la Belga Ŝtato. Du jarojn poste, je la 1a de junio 1983, li mortas en oostenda kliniko. Je la 7a de junio okazas en Brussel kun nacia honoro la funebra ceremonio. Li estas entombigita en la reĝa kripto de Laken. En sia homilio la kardinalo Danneels jene priskribis la Princon: *Sian veran portreton la mortinto ne mem pentris. Lia portreto vivas ĉe Dio, ĉar neniu vivas aŭ mortas nur por si mem.*

Pavilono de la Princo



Sekva ero de la vizito estas la 'Pavilono de la Princo'. Ekde 1950 ĝis sia morto en 1983 Princo Karlo loĝis en ĉi tiu modesta domo. Origine estis simpla loĝejo de korbofaristo el 1865. Post aĉeto de Robert Goffinet en 1935 ĝi ricevis la nunan aspekton. Fronte al la enirejo estas bronza busto de Princo Karlo kiel Regento, farita de la skulptisto Arthur Dupagne. Pli da informoj pri Dupagne estas sub 86.



Arthur Dupagne naskiĝis en Liège en 1895. En la dudekaj jaroj li laboris en Belga Kongo kaj tie trovis plejparton de sia inspiro. Multaj verkoj liaj troviĝis en la iama kolonio. Por la Monda Ekspozicio en Brussel de 1958 li realigis monumentajn verkojn. Li ankaŭ faris sennombrajn bustojn kaj medalojn. Li mortis en Brussel en 1961. Lia verkaro estis tre ŝatata de la Princo kaj dum la Regenteco li ofte eternigis la Princon. Ankaŭ la medaloj kaj la necirkulintaj moneroj el la Flandra Salono estas de li.



La interno de la loĝĉambro surprizas per multkoloroeco. Tiuj koloroj estas zorge riparitaj. La ĉambro estas reinstalita per aŭtentikaĵoj, surbaze de fotoserio farita de la Princo en 1975. La fotoj klare montras ke la muroj estis plenaj je artaĵoj, gravuraĵoj kaj objektoj kiuj havis sentimental valoron por la Princo. Rimarkinde estas la portreto de Leopold II de Julien T'Felt, kiu ornamis la sinsekvajn rezidejojn de la Princo. Ankaŭ estas skulptaĵoj de Reĝino Elisabeth. La fotelo en empiro-stilo, ornamita per leonkapoj, iam apartenis al la meblaro per kiu Napoleon Bonaparte instalas la palacon de Laken. Onidire la Princo ofte ludis la harmoniumon sub la ŝtuparo. Krome estas la golfbastonoj, multaj libroj kaj la pentrista paletro kiuj ilustras multajn facetojn de la personeco de la Princo.



En la koridoro al la kuirejo estas desegnaĵo el 1956 kiu montras la originalan aspekton de la loĝĉambro. Rimarku ke la Princo vere malŝatis malplenajn lokojn. Ĉio estis plenigita, ĝis en la plej etaj anguloj. Je la traboj de la plafono estis granda kolekto de antikvaj armiloj. Multaj fenestroj estis mallumigeblaj aŭ havis sistemon kontraŭ la taglumo. La koloraj fotoj montras la lignan bibliotekon, mal-konstruitan en 1987 kaj ne rekonstruitan.



Sur la muroj pendas litografioj de 'Karlo de Flandrio'. Fakte estas reproduktitaj desegnaĵoj aŭ akvareloj kiuj ekhavis plusvaloron pro la originala subskribo de la Princo. Li kutimis regali amikojn per tia donaco. Multajn gastojn li ankaŭ surprizis per skizo de ilia profilo, farita ene de kelkaj minutoj. En la ŝrankoj estas eroj de la modela fervojo de Princo Karlo. En la brusela palaco la kompleto okupis tutan ĉambron. En Raversijde ne estis sufiĉe da spaco kaj la eroj troviĝis dise en la loĝejoj.



En ĉi tiu kuirejo la Princo akceptis siajn gastojn. Neniu centimetro estis neokupata. Ĉiuj muroj estis plenaj je kolekteroj, medaloj, pentraĵoj kaj eĉ... kuiriloj. Videblas la teleraro kun verda monogramo de Reĝo Albert, uzata de Princo Karlo. Teleraro de Reĝoj Leopold I kaj Leopold II ankaŭ estas konservata ĉi tie. Estas kelkaj nemalfermitaj vinboteloj el la vinkelo de Albert I, kaj kristalaj glasoj kun la monogramo de Leopold II.

La princo kutime pentris en la kuirejo. Veran laborejon li ne havis. Li ankaŭ ne uzis pentrostablon: li simple metis la tolon sur la kuirejan tablon.



La lasta ejo de la domo surprizas per stranga konstruaĵo en formo de ŝtuparo. Estas la iama tegmento, okaze de la pligrandigo transformita al telerara stokejo. Utilis, ĉar la servico de la Princo nombris pli ol 4000 pecojn.

Forlasante la domon, multaj vizitantoj demandas sin kial la Princo preferis simplan loĝejon al aliaj, pli grandaj kaj luksaj. Post la Regenteco oni ofertis al li la kastelojn de Ciergnon kaj Argenteuil. Verŝajne la Princo ne akceptis la proponon ĉar li volis esti sendependa de sia familio, kun kiu la rilatoj en tiu momento estis malbonaj. Li preferis izolitecon en fora Raversijde, kie li havis personan proprietaĵon. Cetere, pro la restado ĉe la brita mararmeo li preferis la maron. Li restis fidela al Raversijde kaj al la maro ĝis sia morto en 1983.



Vilao Goffinet: la nomo rilatas al barono Robert Goffinet, grava persono en la vivo de la Princo, pritraktita en la Memorejo. Li helpis pligrandigi la bienon en la 30aj jaroj. Tial la desegnantoj de la Memorejo decidis doni lian nomon al ĉi tiu konstruaĵo, sed fakte ĝi havas germanan originon. Estis konstruita en 1944 kiel Schreibstube (skribejo), kie troviĝis la administrado de la baterio. Post la milito, laŭ deziro de la Princo, estis aldonitaj kelkaj murapogiloj kaj tegmento, kiuj donu pli agrablan aspekton. Poste la dometo estis uzata de la Princo kiel amuzejo. Ĝi estis konata kiel pingpong-ejo.

Atlantik wall



La dua promenado kondukas vin tra la baterio Saltzwedel neu. Tiu baterio apartenis al la Marine Artillerie Abteilung 204, kiu havis plurajn bateriojn laŭlonge de nia marbordo. Kiel multaj aliaj, tiu baterio dankas sian nomon al konata aŭ grava persono el la germana historio. En ĉi tiu kazo estas la submarŝipestro Reinhold Saltzwedel el la Unua Mondmilito.

Dum la jaroj 1941-1942 la baterio estis finkonstruita. Ĝi konsistis el centra observadejo kaj regejo, kvar artileriaj pozicioj kaj du bunkroj kun artilerio por protekti la flankojn. Ankaŭ estis aera defendo kaj la baterio havis du ĝis tri serĉlumiloj. Radaro ne estis. La soldatoj dormis en personarbunkroj kaj dumtage restadis en barakoj. La konstruaĵoj estis interkonektitaj per aro da galerioj. Plejparto de la elementoj ankoraŭ ekzistas kaj viziteblas. La artileriaj pecoj devnove ricevis lokon en la malnovaj pozicioj. Multaj bunkroj estis riparitaj kaj reinstalitaj per aŭtentika materialo. La baterio Saltzwedel neu estas bona ekzemplo de la Atlantikwall. Pro sia bona konservado ĝi estas inter la plej gravaj eŭropaj muzeoj pri fortikaĵoj.



Jam ekde la komenco de la okupada tempo, en junio 1940, la germana Kriegsmarine ricevis taskon protekti la marhavenojn. Rapide la flandraj marbordaj havenoj de Blankenberge, Zeebrugge, Oostende kaj Nieuwpoort estis protektitaj per baterioj de la Artileria Sekcio 204. Tiuj baterioj tiam nur havis subĉielajn poziciojn.

La preparoj de la Atlantikwall ekis en decembro 1941. Tiam la ekzistantaj marbordaj baterioj apud havenoj kaj endanĝerigitaj regionoj estis plifortigitaj. En aŭgusto 1942 venis la definitiva ordono por la konstruo de la Atlantikwall. La nederlandan, belgan kaj francan marbordojn estonte protektos 15.000 bunkroj. Kiam evidentiĝis ke tiu programo estis nerealigebla, oni nur konstruis bunkrojn por meti kanonojn.

Fine, en 1944, sub feldmarŝalo Rommel estis ellaborita programo kiu precipe celis haltigi la malamikon sur la strando. La strandoj estis plenigitaj per obstakloj, estis konstruitaj kontraŭtankaj muroj kaj eblajn alteriĝejoj oni igis neuzablaj per lignaj fostoj, nomitaj Rommel-asperagoj.

La germana propagandamaŝino grandskale uzis la Atlantikwall. Tamen, je la alteriĝo en Normandio je la 6a de junio 1944 la aliancanoj nur bezonis mallongan tempon por trarompi la defendon. La grandegaj konstruaĵoj, kiuj kostis tiom da mono kaj kiuj haltigu ĉiujn atakantojn, evidentiĝis senutilaj.



Tiu persono apartenas al la organizo Todt. Tiu germana organizo devenis en 1938 el la homoj kiuj konstruis la aŭtovojojn por la Tria Regno. Baldaŭ poste Hitler petis ĝian fondinton, inĝenieron Fritz Todt, konstrui la Westwall (okcidentan muron), kiu estas pli bone konata kiel Siegfried-Linio. Kompreneble tiu organizo ankaŭ ricevis la taskegon konstrui Atlantikwall kaj baldaŭ ĉie eklaboris soldatoj-konstruistoj. Kvankam la organizo tute dependis de la ministro por Militproduktado, Speer, restas la impresio ke estis ia paramilitista organizo. La koloro de la bruna uniformo sendube estis ŝatata de la Nazi-organizoj. La Organizoj Todt havis multegajn laboristojn, inter ili estis multaj postulitaj eksterlandanoj.



Jen kelkaj konsiloj kiuj ebligas al vi plej komforte fari la promenadon tra la subĉiela muzeo Atlantikwall. Akurate sekvu la vojon indikitan per koloritaj sagoj. Verdaj indikas baterion Aachen, flavaj baterion Saltzwedel neu kaj per la ruĝaj vi faras longegan promenadon tra ambaŭ partoj de la muzeo.

Restu sur la vojoj kaj ne eniru la naturareon. Pripensu ke vi promenas en protektita ejo kaj ke la faŭno kaj flaŭro de la dunoj estas tre delikataj.

Ne postlasu rubaĵojn kaj respektu la konstruaĵojn. Pro sekureco ne estas permesata grimpi sur konstruaĵojn aŭ iri en la fermitaj koridoroj. La indikitaj promenvojoj estas tute sekuraj, aliaj povas esti danĝeraj pro sia malbona stato. Kelkaj partoj estas tute fermitaj ĉar en ili loĝas protektitaj kolonioj de vespertoj. Kiam vi troviĝos en zono malpermesita, vi aŭdos alarmsignalon. Ne klopodu mem elŝalti la alarmon, sed kontaktu kontroliston.

Ni deziras al vi agrablan kaj instruigan viziton.

Cirkvito 2



Dum la promenado tra la baterio Saltzwedel neu vi vizitas la plej bone konservitan parton de la Atlantikwall de la belga marbordo. Tiu germana defendolinio estis konstruita dum la Dua Mondmilito, de Norvegio ĝis la limo de Hispanio. Longeco estis preskaŭ 5.300 km. La Atlantikwall (Atlantika Muro) ne vere estis muro, sed densa aro da apogpunktoj, kiu defendu la kontinenton kontraŭ malamika invado de la aliancanoj. Nia promeno gvidas vin tra la pozicioj de la baterio Saltzwedel neu. Kiel aliaj, ankaŭ tiu unuo havis kvar kanonojn kun la bezonata infrastrukturo kaj personaro por funkciigi la kanonojn. La baterio Saltzwedel neu estis konstruita de la germana Kriegsmarine sur la bieno de Princo Karlo ekde la somero de 1941. Komence la celo estis protekti kaj defendi la havenon de Oostende. Ekde la fino de 1942 la pozicio iĝis parto de Atlantikwall kaj poste ricevis la nomon Tirpitz.



Ĉi tiu bunkro estas la ekstremdekstra flanko de la baterio. Ĝi estis konstruita je la fino de 1943 laŭ normigita modelo, germane Regelbau. Estas la tipo R612, ofta en Atlantikwall. La bunkro havas murojn unu metron dikajn kaj pezan tegmenton kaj estas destinita al kampartilerio. La kanonon oni enrulis tra la pordego. En pafpozicio la tubo estis tute ekster la paftruo. Tiu truo fermeblis per ŝtalaj pordoj. Ekde la bunkro eblis pafi rekte al la haveneniĝo de Oostende. Nun enestas germana kontraŭtanka kanono PAK40. Ankaŭ eblis meti la artilerion ekstere, en direkto de la maro aŭ de la landinterno. Maldekstre kaj dekstre estas etaj ĉambroj por stoki provizon de municio. La plafono estas speciale konstruita por akcepti la premegon dum la pafado. En la muroj estas grandaj tuboj por forigi la pulvofumon.

Plejparto de la betonaj bunkroj havas kodon kaj numeron. La signifo de Ost-W 07-370 estas 'Oostende-West', apogpunkto 7, kaj laŭorda numero de la bunkro.



En la niĉo estas soldato kiu funkciigis la kanonon en 1944. Li havas uniformon rimarkindan, ĉar ĝi montras lian rusan devenon. Malgranda kvanto de tiuj volontuloj, nomitaj Osttruppen (orientaj trupoj) dum la lasta militjaro kampadis en Raversijde. Sur la maniko ili portis la insignon la 1a ROA, la rusa liberiga armeo. Tiun armeon kreis en 1943 la kaptitan rusan generalon Vlassov. Kunlaborante kun la germanoj, li volis liberigi Rusion de la komunisma superregado. La germanoj ege malfidis la rusajn militvolontulojn, kaj bataligis ilin ne je la orienta, sed je la okcidenta kaj suda frontoj. Kutime ili estis dividitaj en etajn grupojn, ĉar la germana komandantaro timis malobeon kaj dizerton. Tio efektive okazis dum la lastaj monatoj de la milito. Kelkaj aliĝis al la rezistado, aliaj turnis la armilojn kontraŭ la germanoj. Post la milito atendis ilin trista sorto. De la aliaj aliancanoj Stalin obtenis la garantion ke ili ekstradicios ĉiujn militkaptitajn rusajn volontulojn. Ofte tio okazis, eĉ sub grava politika premo. Plejofte ilin atendis longa enkarcerigo aŭ la morto.



En tiu malpeza konstruaĵo restadis la soldatoj kiu funkciigis la kontraŭaviadilan artilerion. La meblaro konsistas el simplaj lignaj litoj, seĝoj, tabloj kaj ŝrankoj. Laŭnorma Wehrmacht-forno liveris la hejtadon. Per la ŝtuparo vi atingas pozicion kun 2 cm-a kontraŭaviadila artilerio. Estas Oerlikon-tipo, konstruita en 1928. Laŭ germana terminologio nomiĝas 2 cm FLAK 28. Estas de svisa origino kaj havas maksimuman trafopovon de 4.400 metroj. La ŝarĝaparato entenas 15 kartoĉojn.



Ni estas je la originala enirejo de la baterio. Flanke estas gardejo de la deĵoranta suboficiro kaj budo por posteno de tipo ofte uzata laŭlonge de Atlantikwall. La budo estis pentrita per la tradiciaj germanaj kamufladaj koloroj: flava, verda kaj bruna. La loko bone rekoneblas sur foto kun feldmarŝalo Rommel. Li vizitis la baterion je la 21a de decembro 1943 dum unu el siaj multaj kontrolvojaĝoj de la Atlantikwall. Aliloke en la baterio videblas pli da fotoj de tiu vizito. Pli da informoj pri feldmarŝalo (aŭ ĉefgeneralulo) Rommel estas sub 116.



Feldmarŝalo Rommel naskiĝis en 1891 en Würtemberg. Kiel juna oficiro li partoprenis la Unuan Mondmiliton kaj dum bataloj en italaj Alpoj akiris la 'Pour le Mérite', tiam la plej altan germanan militdistingon. Kiel generalo en majo kaj junio 1940 li rapide per tankoj trapenetris Belgion kaj Francion. En februaro 1941 li iĝis estro de la Afrika Korpuso en Libio. Tie li ricevis la kromnomon 'dezerta vulpo'. Post la konkero de Tobruk, je la 21a de juni 1942, li promociis al feldmarŝalo, la plej alta milita rango en la germana armeo. Kiam la britoj ekkonkeris Nord-Afrikan, Rommel estis translokigita al Okcident-Eŭropo. Ekde novembro 1943 li respondecis pri la protektaj laboroj je la Atlantiko. Li faris sennombrajn kontrolvojaĝojn kaj ĝis ekstremo stimulis siajn komandantojn. Je la 6a de junio 1944, la tago de la albordiĝo en Normandio, Rommel estis ĵus forvojaĝinta al Herrlingen apud Ulm, okaze de la naskiĝtago de la edzino, hazarde je la 6a de junio... Rapide li revenis, sed ne sukcesis malsukcesigi la aliancanan alteriĝon. Post la atenco je Hitlero de la 20a de julio 1944 Rommel estis suspektita. Laŭ ordono de Hitler li estis devigita al sinmortigo.



La germanoj transformis etan areon en la dunoj al Appelplatz (paradejo). Tie ofte venis alrangaj vizitantoj. Admiralo Karl Dönitz honorigis la baterion per mallonga restado kaj feldmarŝaldo Rommel inspektis ĝin je la 21a de decembro 1943.

Apud la paradejo estas granda serĉlumilo. Ĝi havas diametron de 150 cm kaj atingis 10 km.

Laŭlonge de la promenvojo troviĝas kelkaj tipaj strand-obstakloj:

1. Trunkoj, metitaj en la sablo, oblikve direktitaj al la maro, kun mino aŭ grenado. Tiuj obstakloj devis elimini alteriĝ-ŝipojn.
2. Aliaj trunkoj estis metitaj sub la linio de la alta tajdo kaj havis minojn aŭ dentojn por traŝiri alproksimiĝantajn ŝipojn.
3. Cointet-elementoj, ankaŭ nomitaj 'belgaj pordegoj'. Tiuj grandaj ŝtalaj konstruaĵoj antaŭ la milito funkciis kiel kontraŭtankaj defendiloj. La germanoj metis ilin sur la strando por malhelpi alteriĝ-ŝipojn kaj tankojn. La montrita ekzemplero estis trovita antaŭ nelonge sur la strando de De Panne.
4. Nusscracker-Mino (nuksrompilo-mino). Tiuj obstakloj kutime konsistis el peza betonbloko, kun spaco por minoj, bomboj aŭ eksplodiloj, kiujn eksplodigis la premo de baskulanta relo.
5. Je la belga marbordo ankaŭ estis trovitaj pli simplaj versioj de la nuksrompilo-mino, nur konsistantaj el feraj profilaĵoj.
6. Tipaj por la Dua Mondmilito estas la 'ĉefaj erinacoj', kiuj multnombre troviĝis sur la strandoj. Kutime ili estis pezigitaj per betonblokoj por eviti forflasadon.
7. Piramidoj el fero kaj betono estis obstakloj facile produktablaj aliloke kaj munteblaj surloke.



La fiŝista dometo estis konstruita en 1936 de Barono Goffinet, amiko de Princo Karlo. Dum la milito en ĝi loĝis baterio-estro Robert Koppe. Antaŭ kelkaj jaroj ĝi estis komplete rekonstruita. Enestas ekspozicio pri la strand-obstakloj dum la Dua Mondmilito.

La protekto de la strando ĉiam estas ege grava, precipe kiam oni atendas malaman agadon de sur la maro. Plejparto de la obstakloj troviĝis inter la linioj de alta kaj malalta tajdoj. Desegnaĵo montras la sinsekvajn obstaklojn: minojn en la maro, ferajn retojn kontraŭ malamikaj submarŝipoj, obstaklojn el betono aŭ metalo, eĉ flamĵetilojn por unufoja uzo, funkciigitaj de distanco. La germanoj ankaŭ konstruis multajn kontraŭtankajn murojn. Se vi deziras scii pli pri la Cointet-elementoj kaj pri la Belga Fera Muro, iru al 118.



Antaŭ la Dua Mondmilito en Belgio ekzistis granda defenda linio, de la fortikaĵoj ĉirkaŭ Antwerpen, tra la Albertkanalo, ĝis la fortikaĵoj de Liège kaj Namur. Plej konata kaj moderna de tiuj fortikaĵoj estis tiu de Eben-Emael.

Kiam, okaze de malprospero, pozicio estis forlasita, estis alia linio je 80 km enlanden, inter la fortikaĵo de Koningshooikt apud Antwerpen kaj Wavre. Tiu

linio nomiĝis la Koningshooikt-Wavre-Linio, kutime KW-Linio. Ekde la 20a de novembro 1938 la KW-Linio estis plilongigita de Wavre ĝis la fortikaĵo de Suarlée, apud Namur. La Antwerpen-Namur-linion la aliancanoj kutime nomis la Dijle-pozicion.

Tiu pozicio laŭeble multe estis protektita de akvovojoj kaj inundoj. Je sekaj lokoj oni metis ferajn obstaklojn, kun formo de pordegoj, inventitaj de la franca generalo Cointet, do malprave nomitaj 'belgaj pordegoj'. Kvankam ili estis multe pli grandskale uzitaj por la franca Maginot-Linio, ili tamen estis tipaj por la KW-Linio. Por la konstruo de la pozicio estis bezonataj 30.000 Cointet-elementoj. Dum la militjaroj la germanoj metis ĉiujn apud la marbordo. Hodiaŭ restas nur malmultaj.



Ĉar komence la germanoj devis utiligi ĉion ajn, plejparto de la kanonoj laŭlonge de la atlantika marbordo konsistis el kaptita materialo. Ankaŭ la baterio Saltzwedel ne havis belgajn pecojn. Estis kvar kaptitaj belgaj 120 mm-kanonoj. Origine ili troviĝis sur lignaj platformoj sur la strando, sed baldaŭ estis pretaj bazoj el betono. La pozicioj estis bunte farbitaj. La kanono povis rotacii je 360°. Por la personaro estis ligna platformo.

La municio estis alportita el bunkroj kaj kunmetita en dometo je maldekstro. Malgranda stoko de preta municio estis en la niĉoj, je la rando de la pozicio. Necesis sep ĝis ok homoj por funkciigi la pecon. Tiuj kanonoj nur malofte pafis al realaj celoj.

En aprilo 1944 la kanonoj estis translokigitaj al Francio. Ili finis sian ekziston en la baterio de La Pointe du Roc, apud Granville en la Cotentin. Tie restas unu el la detruitaj pecoj kiel silenta memorajo.

Pli da informoj estas sub 119.



La 120 mm-kanono modelo 1931 estis fabrikita de Cockerill kaj interalie uzata ĉe la belgaj 13a kaj 14a Artilerio-Regimentoj. Verŝajne ne estis faritaj pli ol 36 ekzempleroj. La pezo de pafpreta peco estis 5.450 kg; maksimuma trafpovo estis 18 km. Post la kapitulacio de la belga armeo, je la 28 de majo 1940, la germanoj arigis la kanonojn. Ili eniris la germanan nomenklaturon kiel tipo K370(b).

Por ekpafi necesis longa proceduro. La municio estis kunmetita en muntadejo. Tie la ĉelo de grenado ricevis fuzaĵon; ankaŭ la kartuĉo ricevis fuzaĵon por eksplodigi la ŝarĝon. Unue la grenado estis ŝovita en ĉambron je malantaŭa flanko de la kanono. Poste sekvis kartuĉo kaj ŝarĝo. La tuto estis bone densigita kaj poste la kulaso estis fermita. Post fikso de deklivangulo kaj direkto, oni atendis la pafordonon.



En oktobro 1943, kiam plioftiĝis la aliancanoj aeratakoj, la germana ĉefkomando ordonis meti ĉiujn artileriecojn en kovritaj pozicioj. Tio ankaŭ havis sekvojn en Raversijde. Kvar mararmejaj kanonoj je kalibro de 10,5 cm, de kiuj restas du, metitaj en novaj bunkroj, transprenis la taskon de la belgaj kanonoj. La bunkroj estis pretaj en aprilo 1944. Ili estas de la tipo R671, verŝajne la plej ofta tra Atlantikwall.

Tiuj kanonoj origine staris sur la ferdeko de germanaj submarŝipoj. Ili troviĝis sur peza soklo sed havis nur limigitan pafangulon de 80°. La pafaperturo estis ŝirmebla per ŝtalaj retoj. Dum la pafado la pulvofumo estis forigita tra grandaj tuboj en la muroj. Post la pafado, la varmega kartoĉo estis ĵetita en akvujon por malvarmiĝi.

La municio estis metita en du niĉoj, protektita kontraŭ humideco per konteneroj el zinko.

En unu niĉo estas soldato de la mararmea artilerio kun speciala kapricevilo, preta por transdoni instrukciojn de la baterio-estro. Pli da informoj pri la uniformo de la mararmea artilerio estas sub 120.



La soldatoj de la mararmea artilerio ne portis bluan, sed griz-verdan uniformon. La uniformo havis grizajn aŭ kuprokolorajn butonojn kun ankro kaj ŝultraĵojn kun orkolora flugilhava grenado. La soldatoj de Sekcio 204 portis – kontraŭ ĉiuj reguloj – flavan asterion sur sia kepo aŭ ĉapo. Tiu insigno ankaŭ troviĝis sur la flago de la baterio kaj sur la veturiloj de la unuo.

La preferata elirvestaĵo tamen estis la blua mararmea uniformo. Ĉar tia uniformo ne troviĝis inter la normala ekipaĵo, kelkaj proprakoste farigis tian uniformon ĉe loka tajloro. Dum la normala laboro la soldatoj surmetis la klasikan blankan kostumon aŭ simplan grizan veston kaj pantalonon sen insignoj.



Ni estas apud la pozicio de la dua belga 120 mm-kanono Rimarku ke la konstruaĵo estas en rimarkinde bona stato. En la eta alkonstruaĵo oni pretigis la municion. Tie la grenadoj kaj kartoĉoj ricevis sian fuzaĵon. Vi vidas labortablon kaj niĉojn kie la preta municio estis stokita.



Ĉiu pafpozicio havis etan stokon da municio ĉemane. La grandaj stokoj estis konservitaj en tiuj bunkroj el 1941. Ili estas parte subteraj kaj kovritaj per herbo. Pro sekureco la 120 mm-grenadoj kaj la ŝarĝoj estis aparte stokitaj: grenadoj dekstre, kartoĉoj kun ŝarĝoj maldekstre. De ĉi tie oni portis la municion al la

pozicioj, kie oni en eta ejo muntis la fuzaĵojn. Kiam, en 1944, oni transportis la belgajn kanonojn al Francio, oni ankaŭ kunportis ĉiun municion. La municio de la novaj 10,5 mm-kanonoj estis malpli granda kaj staplita en ambaŭ ejoj, ĉar grenado kaj kartuĉo estis unu tutaĵo. Kompreneble estis malpermesite fari fajron aŭ fumi en la municio-bunkroj.



La centro de la baterio estis la observad- kaj regad-bunkro. Tiu impona bunkro gastigis multajn homojn kiuj plenumis diversajn taskojn. Ekstere estas ligna alkonstruaĵo kun necesejoj.

En la supro de la bunkro estas ujo el betono kun peza distancmezurilo, 4 m longa. Tiu ilo difinis distancon al ebla celo; tra paroltubo la donitaĵoj estis transdonitaj al kalkulĉambro.

La soldatoj kaj suboficiroj restadis en etaj ejoj kun mallarĝaj litoj, per ĉenoj penditaj je la plafono. La dekstra ĉambro, en kiu loĝis 15 personoj, montras kiom kunpremite ili vivis. Tipe estas la speciala hejtigilo. Estas ŝranketoj por la personaj havaĵoj. Kaskoj kaj kontraŭgasaj maskoj estas pretaj por uzo.



Centre en la bunkro estis ampleksa komunikilaro, kiu ebligis la komandanton kontakti siajn estrojn en Oostende. De ĉi tie ankaŭ estis transdonitaj ĉiuj ordonoj al la kanonistoj. Plej interesa estas la observejo, kie vi povas denove gustumi la etoson de la 'plej longa tago'. La ejo havas larĝan, horizontalan fenestron, kun vido de Nieuwpoort ĝis la haveneniĝo de Oostende. Sur la muro estis indikitaj la distancoj. Sub la fenestro pendas siluetoj por plifaciligi la rekonon de malamikaj aviadiloj.

Eta ĉambro estas je dispono de la komandanto. Plejofte li estis la nura oficiro en la baterio. Vi vidas vizitantajn admiralon kaj stab-oficiron. Ili staras ĉirkaŭ Enigma-kodigilo, funkciigita de oficiro de la mararmea administrado. Pli da informoj pri la Enigma-maŝino estas sub 122.



En la observada bunkro de la baterio Saltzwedel ne estas ordinaraspekta germana oficeja aparato en ligna ujo. Estas la fifama Enigma-kodigilo. Per tiu maŝino mesaĝoj estis ĉifritaj kaj malĉifritaj. La germanoj opiniis ke la aliancanoj ne kapablis malĉifri tiajn mesaĝojn. La kodo estis instalita metante dentitajn rolojn en iu pozicio. Dum la milito aldoniĝis roloj por plikomplikigi malĉifradon. La kodo ŝanĝiĝis ĉiun tagon, poste eĉ ĉiun duonan tagon. Tamen la aliancanoj sukcesis rompi la sekreton, precipe danke al polaj kaj francaj spionservoj kiuj jam antaŭ la milito okupiĝis pri la malĉifrado. La rompo de la kodado okazis en Bletchley Park, sekreta ĉefsideo de la brita kontraŭspionado. Por tio estis desegnita la

tutunua komputilo. La malĉifrado de la Enigma-mesaĝoj estas unu el la plej bone konservitaj sekretoj de la Dua Mondmilito. Tiel eblis decidi la senbridan germanan submarŝipmiliton en la Atlantiko favore al la aliancanoj. Ĝi ankaŭ

influis la evoluon de la dezerta milito en Norda Afriko. Enigma-maŝinoj estas ege raraj en la kolektoj de eŭropaj muzeoj.



Tiu bazo de unu el la belgaj 120 mm-kanonoj. Ankorau estis alikonstruita en la somero de 1944. En la cemento legeblas la dato 10 junio 1944. La pozicio estis adaptita en tiu periodo por malpeza kontraŭaviadila artilerio. Estas FLAK 36. Tiu kanono havis kalibron de 3,7 cm, tio signifas ke ĝi pafis kartoĉojn kun diametro de 3,7 cm. La kartoĉoj estis po 6 en ujoj. Trejnita personaro povis lanĉi 80 ĝis 100 pafojn minute. Pafado estis akurata ĝis alteco de 2 km. La konstrulaboroj en tiu loko montras la nervozecon post la invado en Normandio.



En ĉi tiu bunkro oni stokis la provizojn. Estas konstruaĵo el brikoj kun malpeza

tegmento el betono. En la antaŭa koridoro jam estis indikilo al proviant- kaj gasbunkro. En la unua ĉambro estas aro da feraj kestoj en kiuj oni transportis mangrenadojn. Ankaŭ estas sakoj el juto, uzataj por rapide kaj malmultekoste konstrui muretojn. En flanka ĉambro estas multe da municio por manarmiloj,

precipe fusilo-kartuĉoj en lignaj kestoj. Ankaŭ estas kelkaj gasprotektiloj. En la dua ĉambro la kanadaj liberigantoj malkovris kaj gustumis la restantan provianton. Ili apartenis al la 2a Kanada Infanteria Divizio kiu liberigis la marbordan regionon en septembro 1944.

Pli da informoj pri tiu liberigo estas sub 123.



La invado de la aliancanoj okazis tre rapide. Post la alteriĝo en Normandio je la 6a de junio 1944 la britoj dum longa tempo estis haltigitaj ĉirkaŭ la franca urbo Caen, sed jam je la 25a de aŭgusto Parizo estis liberigita. Antwerpen, kiu iĝu grava haveno por la aliancanoj, estis okupata je la 4a de septembro. La liberigo de la marbordo sekvis poste. La germanoj forlasis la baterion Saltzwedel neu je la 7a de septembro. Kvankam oni principe devis detruigi la bateriojn je retiriĝo, nur la artilerion sur fiksaĵoj kaj direktitan al la maro oni igis neuzbla. La kanadanoj senprobleme povis okupi la baterion. Multe da municio postrestis diversloke kaj estis fortransportita post la milito. La artilerio nur malaperis en 1946. Plejparto de la baterio Saltzwedel neu ne estis malkonstruita, pro persona peto de Princo Karlo, kiu deziris konservi ĉiujn fortikaĵojn en sia bieno.



La eta konstruaĵo klare apartenas al la novaj iniciatoj de feldmarŝalo Rommel. La hasta konstruado de tiu ejo enlande povas esti rekta sekvo de la alianca invado en Normandio je la 6a de junio 1944. Efektive: sur flanko muro legeblas la dato 4.8.1944. Tiu pozicio, direktita enlanden, aspektu solida al eventualaj atakantoj. En realo estas brikoj kun stuko. Estis kontraŭtanka kanono por ataki la landinterton. La eta kanono el 1936 en 1944 jam estis ege malnoviĝinta. Ĝi tamen akiris konsiderindan povon per uzo de kontraŭtanka grenado, ŝovita sur la tubo.



La soldatoj dumtage vivis en lignaj ejoj sed tranoktis en pezaj personaraj bunkroj. Tiaj bunkroj, el la plej frua konstruado de la baterio, gastigis 30 soldatojn kaj 3 suboficiojn. La enirejo estis pentrita per kamuflad-koloroj kaj eblis per hoko fiksi kamuflad-retojn super la muroj.

Per eta koridoro alireblas meza ĉambro por tri suboficioj kaj du pli grandaj flankaj ĉambroj por soldatoj. Estas ege malmulte da spaco. Tipaj por la mararmeo estas la litoj. Ili pendas po tri, unu super la alia, kaj estas faldeblaj. Plafono estas konstruita el ŝtalaj elementoj, kiel en plejparto de la bunkroj. Estas elektro kaj aerumado. Por la hejtado estas rondaj karbofornoj Wt 80 aŭ Wt 80K kun kuirplato. Je unu lito estas blua uniformo: la aŭtentika uniformo de la soldato kiu dormis en tiu lito. Ĝi havas etiketon de oostenda tajloro. La soldato donacis ĝin al la muzeo antaŭ kelkaj jaroj.



En ĉi tiu ĉambro estas fotoj de la epoko, kiujn havigis al ni eks-soldatoj de la baterio. La fotoj montras la diversajn konstruaĵojn kiujn vi povis viziti dum la promonado. Vi vidas la paradejon, la enirejon, la kantinton, la lignajn loĝejojn, la poziciojn, la lumĵetilon, la kanonojn subĉielajn kaj la observejo kun distancmezurilo.

Precipe grava estas la serio kiu ilustras la viziton de feldmarŝalo Rommel je la 21a de decembro 1943. Gvidis lin la komandanto de la baterio. Dum ilia mallonga promonado ili haltis en la diversaj lokoj kiujn vi vizitis.



Jen la personaj distingoj de ŝipleŭtenanto Reinhold Saltzwedel: la Unuaklasa Fera Kruco, la Kruco de la Ordeno de Hohenzollern kaj la postmorte atribuita submarŝipinsigno. La baterio Saltzwedel neu estis nomita laŭ tiu submarŝipestro el la Unua Mondmilito.

Reinhold Saltzwedel naskiĝis en 1889. Li ricevis en 1917 la 'Pour le Mérite', la plej altan germanan distingon el la Unua Mondmilito, ankaŭ nomitan 'Blue Max'. Saltzwedel forveturis 22 fojojn kaj detruis 111 komercajn ŝipojn. Dum la lasta misio la UB.81 je la 2a de decembro tuŝis etan britan minon kaj sinkis. Neniu el la personaro estis vundita, sed la ŝipo ne plu sukcesis supreniri. Naŭ homoj estis elŝovitaj tra la torpedo-tubo kaj atingis la surfacon. Apuda brita patrolŝipo prenis sep, sed tuŝis la submarŝipon, kiu rompitis. La ceteraj homoj, inter ili komandanto Saltzwedel, dronis.



La promonado pluiras tra komplika reto de kovritaj koridoroj, tra kiuj eblis atingi plejparton de la pezaj konstruaĵoj. Ĉiuj koridoroj estis lumigitaj; sube estis telefonkabloj. Je regulaj distancoj estis kvadratformaj savelirejoj, origine kovritaj per plato el betono. Kelkloke estas enkonstruitaj rondaj infanteri-pozicioj por malpezaj armiloj. La plej malnovaj koridoroj estas el briko; ekde 1944 plejofte estis uzataj betonŝtonoj. Pro la maldika tegmento, la koridoroj ne protektis. Celo de la germanoj estis resti nevideblaj por aliancaj esploraviadiloj.



En ĉi tiu pozicio troviĝas aerdefenda artilerio Bofors, laŭ germana nomenklature 4 cmFLAK28. La germanoj en 1940 kaptis multajn tiajn sveddevenajn pecojn en Norvegio, Nederlando, Belgio kaj Francio kaj metis ilin je Atlantikwall. La kanono pafas grenadojn kun diametro de 4 cm, en ujoj de po 4. Maksimuma trafpovo estis 8 km. Tiuj kanonoj estis tre fidindaj. Ĝis antaŭ nelonge ili estis uzataj de la belga mararmeo.



En tiu ronda pozicio estas aerdefenda artilerio de tipo FLAK 38 kun kalibro de 2 cm, konstruita en 1938. Unu persono sufiĉis por funkciigi ĝin. Kun rapida provizo de municio eblis 400 pafoj minute. En la alfiksitaj ujoj falis la uzitaj kartoĉoj.

De ĉi tie vi havas bonan vidon al la restadejoj de Princo Karlo. La historio de tiuj konstruaĵoj ofte originas ĝis la germana okupado, ĉar la germanoj uzis ekzistantajn ejojn kaj konstruis novajn. La suboficiraj instalas sian manĝejon en la loĝejo de la Princo. Antaŭ ĝi estis malgranda flagstango kun la flago de la baterio. Por la soldatoj oni konstruis grandan kantonon, transformitan poste de Princo Karlo al Flandra Salono, laŭ modelo de salono en la Reĝa Palaco en Brusel. Domo, konstruita de la germanoj en la printempo de 1944, funkciis kiel oficejo kaj nun estas la Vilaĝo Goffinet, de kie ni ekpromenis.

Ni esperas ke vi ĝuis la viziton. Aliajn fojojn ni eble povos bonvenigi vin en alia parto de la subĉiela muzeo, kun la baterio Aachen el la Unua Mondmilito, la nura restanta baterio de la Unua Mondmilito je la belga marbordo.



Kie vi trovos la klarigan tekston?



WALRAVERSIJDE EN LA JARO 1465

En Raversijde, apud Oostende, viziteblas ekspozicio pri mezepoka fiŝista vilaĝo situanta apud la nuna loĝkerno. Konsistanta el du partoj, ĝi unue prezentas la historion kaj poste la loĝintaron de tiu vilaĝo jam malaperinta antaŭ kvar jarcentoj.

Mezepoka fiŝista vilaĝo rakontas

La marbordo de Flandrio ne ĉiam estis tiel rektlinia kiel hodiaŭ. Apud ĝi iam troviĝis la nun malaperinta insulo "Testerep" malligita de la kontinento per tajda ŝanelo kiu nun ne estas pli ol sensignifa fosaĵo. Sur tiu insulo - sur la hodiaŭa strando - ekestis en la dua duono de la 13a jarcento loĝkerneto nomita "Walraversijde": la albordiĝejo de Walraf. Pro insula erozio kaj duna transbloviĝo dum la 14a-15a jarcentoj, la enloĝantoj estis devigataj transloĝiĝi kontinenten. Sekve konstruiĝis nova loĝkerno malantaŭ digo plifortigita sub instigo de kaj nomita laŭ la tiama Burgunda duko Jan Zonder Vrees (Johano Sen Timo). Tiuj terenoj malantaŭ la digo, kiujn nuntempe minacas konstruotaj vojoj, parkejoj, kafeterio, ktp, estas arkeologie ekzamenataj ekde 1992.

La nova loĝkerno prosperis dum la 15a jarcento, ebligante konstrui malgrandan preĝejon. Ekde la fino de la 15a jarcento sinsekvaj krizoj, kies kulmino estis la terura Sieĝo de Oostende (1601-1604) far la hispana armejestro Spinola, enkondukis la ruiniĝon kaj la pereon definitivon de Walraversijde. Nun, 400 jarojn poste, mezepoka fiŝista vilaĝo rakontas sian historion.

Vivi en mezepoka fiŝista vilaĝo

La Walraversijdanoj enloĝis rektangulajn, ĉirkaŭpavimitajn domojn, longajn 12 ĝis 17,5 metrojn kaj larĝajn 5,5 ĝis 6 metrojn. Ekzameniĝis jam 25 el tiuj. Plej ofte la muroj konsistis el ŝtona soklo sur kiu troviĝis supra parto ŝmirkovrita de argilo. Ege interesaj historiaj fontoj estas la barelputoj: akvoputoj faritaj per kverkaj bareloj sen kovrilo nek fundo, metitaj unu sur la alian. Dendrokronologie oni kapablas precizege kalkuli la hakiĝdaton de la arboj, kaj per tiuj donitaĵoj retrovi la konstruan evoluon de la vilaĝo.

La arkeologiaj malkovraĵoj ebligas rekonstrui sufiĉe detale la materian kulturon de la enloĝantoj, tiel eĉ, ke oni kapablas prezenti ĝin laŭ la kalendaro. Jen kelkaj ekzemploj:

Januaro: kanabofibroĵo estas ŝpinataj kaj tordataj; per la fadenoj la fiŝistoj trikas siajn retojn;

Februaro: ĉasado kaj kaptado surmara de focenoj (marporkoj) kaj delfenoj. Kaĉalotojn surstrandiĝitajn oni surloke distranĉas.

Aŭgusto: Ek al la maro! La fiŝistoj de Walraversijde ŝipveturas ĝis kaj eĉ post Skotlando por kapti kaj en la proksimaj havenoj vendi freŝkaptitajn fiŝojn; hejmen ili transportas peklitajn fiŝojn. En Flandrujo vendiĝas kaj en la vilaĝo mem konsumiĝas kapta¹/₄oj el pli proksimaj marpartoj. La vilaĝanoj hokfiŝas angilojn kaj karpojn en nesalaj akvo.

Septembro: Implikataj en armeaj aktivecoj, la fiŝistaj vilaĝoj ofte devigite partoprenas en militaj agadoj. Cetere la flandraj fiŝistoj ne estas malinklinaj al piratado.

Oktobro: Ekonomiajn rilatojn la enloĝantoj de Walraversijde havas kun Anglio, la Balta regiono kaj Sud-Eŭropo.

trad. JVE